



Bulteno de la Esperanto-Federacio « Languedoc-Roussillon »

5, Quai Vauban - **66000 PERPIGNAN** (Pyrénées-Orientales) - ☎ 34.38.84

JARA ABONO : **3 F.**

C. C. P. 956-28 Montpellier

1 - an Kvaronjaro 1973

N° 46

Grava Alvoko

La **KONGRESO « Languedoc - Roussillon »** okazos en Alès la 8-an de aprilo 1973.

Samtempe kaj samloke okazos la « **Printempa kunveno de la Fervojaj Esperantistoj** ».

Ĉiuj samideanoj estas kore invitataj partopreni en tiu manifestacio.

Jen la programo :

* — **Sabato la 7-an matene** : alveno de la partoprenantoj.

La akceptoj sidos en la stacidomo kaj en la « Centre Culturel Communal ». (place Henri Barbusse, fronte al la juĝejo).

Tagmeze, laŭvole, komuna manĝo en restoracio je modesta prezo. Post la manĝo, vizitoj de la « Laboratorio de citopatologio » kaj de instalaĵoj kaj Galerioj de karbo-minejo. (Ebleco uzi aŭtobuson prezo **5 frankojn**) por tiuj, kiuj ne havas aŭtomobilon.

Reveno proksimume je la 18-a horo.

Post la vespermanĝo, je la 20-a h. distra parto ĝis la 22-a h. teatraĵoj, dancoj, kantoj.

* — **Dimanĉo la 8-an** : (post la disservoj) kunvenoj en la " **Kultura Centro** ", la du asocioj aparte, kompreneble.

Je la 11 h. 30 ; honorvino en la urbodomo.

Post komuna manĝo en la restoracio "l'Oronge" en St-Jean du Gard, ekskursoj al la « Musée du Désert » kaj al la « Bambuseraie » en Prafrance, reveno je la 18-a horo.

Prezoj : **25 F.** por tiuj, kiuj uzos aŭtobuson.

22 F. por tiuj, kiuj uzos propran aŭtomobilon.

Por la rezervado de aŭtobusoj, komuna manĝo, vizitoj, kaj eventuale dormocambroj, bonvolu plenumi la aligilon, presita sur lasta paĝo de tiu S. F. S.

Rolf PELLETIER

LA RIBELO DE L'KAMIZARDOJ

(iom da historio)

Ĉe la komenco de la 16a jarcento, la Reformacio rapide disvastiĝas tra Langvedoko. Baldaŭ multiĝas la Protestantoj.

Diskutoj, disputoj, bataloj kontraŭmetas anojn de la du religioj.

Edikto de Nantes (1545) alportas pacon, kiu ĉesas post la morto de Henriko la 4a.

Ĉe la komenco de la regno de Ludoviko la 13a, Maria de Medicis kaj Richelieu entreprenas submeti la Protestantojn.

La rezistado akre manifestiĝis en Cevenoj. En 1622, duko Henriko de Rohan fariĝas estro de la Protestantaj eklezioj por Guyenne kaj Haut Languedoc kaj komencas kontraŭbatali la reĝajn armeojn.

Ve post la okupo de La Rochelle fare de Richelieu, la Protestantoj senkuragiĝitaj konsentas la "pardon-edikto" (paix d'Alais) 1629.

Trankvila periodo sekvas, ĝis kiam Ludoviko la 14a klopodas perforte aŭ persvade katolikigi la protestantojn. Li sendas "dragonojn" loĝi ĉe la protestantoj por devigi ilin abdiki sian religion. En 1685 la reĝo nuligas la edikton de Nantes; multaj protestantoj fuĝas eksterlanden.

En Cevenoj, ili restas, Kontraŭ la subpremo, ili rezistas. Iliaj ĉefoj estas metiistoj, kamparanoj, ne instruitaj sed inteligentaj kaj decidemaj: Jean CAVALIER, Roland LAPORTE... Por sin rekoni unu la alian, la kalvianoj surmetas ĉemizon sur siaj vestoj. De tio devenas la nomo Kamizardo.

Kuraĝege, ili defendas sian religion uzante la naturajn kasejojn de la regiono, organizas "Asembleojn de l'dezerto" for de l'vilaĝoj sur la montaro.

La reĝaj soldatoj persekutas la rezistantojn, incendias vilaĝojn kaj anoncas prezon: pli ĝuste premion por la "kapoj de l'ĉefoj".

La kaptitojn oni sendas sur reĝajn galerojn, kie, enĉenigitaj meze de krimuloj kaj banditoj, kovritaj de pedikoj, ili remas ĝis fort-uzo sub la vip-batoj de l'gardistoj. La inoj estas enkarcerigitaj. Kelkaj el ili restis dum pli ol 30 jaroj en "Turo de Constance" en Aigues-Mortes.

Por ĉesigi la rezistadon, la reĝo sendas Marsalon de Villars. Jean CAVALIER rezignas kaj abdikas.

Sed Roland daŭrigas batali, sed baldaŭ estas mortigita en Castelnaud-Valence apud Uzès. La Kamizardoj ĉesas la armitan rezistadon.


Por memori tiun periodon, la protestantoj kreis je 1910, la Muzeon de l'Dezerto" (1) en la mas Soubeyran, naskiĝloko de Roland. Ĝi situas en la valo de Miallet pli konata sub la nomo de valo del'Kamizardoj".

Okaze de nia dimanĉa ekskurso, ni vizitos tiun muzeon. Ĝi estas interesa ne nur pro la memoraroj sed ankaŭ por kompreni kiel vivis la homojn en tiuj tipaj Provencaj-Langvedokaj farmoj nomataj "mas".

(1) - "Dezerto", ĉar, por la protestantoj tiu nigra periodo similas al traire de l'dezerto fare de la fuĝantaj hebreoj.

René RAYNAUD.

La renaskiĝo de Pompei





Est nelonga tempo, mallonge la televido dissendis novaĵojn pri grava ekspozicio, kiu okazas nun en Parizo kaj daŭros tri monatojn, tia ekspozicio koncernas multnombrajn restaĵojn, transportitaj el Italio, pri la urbo Pompei (Pompejo). Tial mi ekpensis al personaj spertoj pri la arkeologia vojaĝo, kiun mi faris pasintan someron en suda parto de Italio.

Unue estas bone indiki la pozicion de Pompei sur la geografia karto, ĝi situas proksimume iom malsupre de la mezo de la boto najbare de Napolo.

Pompei tiam estis nur simpla romana provinco sub la impero de Tito, sufiĉe riĉa, kaj la loĝantoj trankvile vivis kaj prosperis laŭ favoraj kondiĉoj, kiuj permesis fondi kolonion, el apuda timeginda ĉefurbo Romo.

Sed, kio okazis ekzakte, ke ĝis niaj tagoj ĝi estu tiel fama urbo? Historio komunikis al ni ĝian teruran aventuron. Fakte estis inter la 10 horo kaj 13 h. matene la 24-an de aŭgusto en la jaro 79, kiam ekvenis apokalipso. Krome oni devas scii, ke tre apude al Pompei, nur malmultajn kilometrojn estas impona vulkano nomita Vesuvio (Vezuvo). Do, sen specialaj signaloj, improvize, tamen per granda bruego la lafoj elfluante el monto vekiginta, enterigis por longaj jarcentoj Pompei, la fandita varmega materio abrupte ĉesigis vivon al urbo de ĉirkaŭ 40.000 loĝantoj kaj kovris ĉion kio troviĝis sur ĝia vojo, tutaj domoj, palacoj, temploj, stratoj, sen lasi post-signojn, ke tie eĉ ekzistis urbo.



Enterigita el ĝiaj cindroj, Pompei revivas hodiaŭ per siaj domoj, siaj magazenoj, sia Katedralo, siaj banejoj kaj teatro. Do mi invitas vin promeni mallonge inter tiuj renaskiĝintaj stratoj, eĉ penetri en kelkajn patriciajn domojn por malkovri la rafinitajn stilojn kaj luksan pompan brilecon en vivmaniero.

Trairante la forumon aŭ marŝante sur la ŝtuparoj de la admirinda romana amfiteatro, vi facile ekkredus aŭdi ankoraŭ la voĉojn de la multesciaj loĝantoj kaj la konfuzajn bruojn el komerca urbo, plenplena je mildeco sed


tiel ĝuste fama. Promenante sur la stratoj vi rimarkos karakterizon de rektaj anguloj kaj bonan staton de konservado de la ŝoseo, vere estas ĉiam sama kiel dum antikveco, ĉar estas artefarita per nedetruablaj stonegoj.

Enirante en la domojn vi havas impreson uzurpi la trankvilecon de la mastroj, ĉar kiam vi estas ĉe la antaŭkorto (atrio) vi rigardus belajn ornamitajn kornicojn, aŭ la refaritajn ĝardenojn aŭ la pentraĵojn, kiuj malgraŭ elpreno por la muzeoj kaj konsiderante la ŝteladojn de la fremdaj invadoj, oni trovas ankoraŭ multe da trezorartoj. Vi timas do ĝeni la proprietojn per via neatendita vizito.

Tre famkonataj estas la domo de la Faŭno, de la fratoj Vetti, de la Oraj Amoroj, kie vi ektrovos delikatajn erotikajn pentraĵojn kaj statuojn. Kontraŭe en la domo de Menandro vi renkontus tragedion de la vulkano, per gipsaj statuomodeloj en natura formato laŭ iliaj pozicioj, kiuj estis mortkaptitaj.

Strange tamen mi restadis ege frapita rigardante la ĉiutagajn komunajn objektojn de la pompejanoj, pro ilia efika taŭgeco konsiderante tiun epokon, ekzemple oni vidas kombilon, spegulon, la ilojn por la kurejo, la dormoĉambrojn kompletajn de litoj, seĝoj, tabloj, kaj multnombraj hejmaj-aferoj.

Pli poste, rigardante ankoraŭ la panejon, la trinkejon, vi certe restos konfuza pri la reala viveco, kiu konservas ĉion, malgraŭ la jarcentoj pasintaj en tiuj lokoj. En la placo de la militlernejoj, aŭ en la apuda cirko ŝajnas denove aŭdi bruon de la glavoj el spektakloj de gladiatoroj.



Al mia menso nun ekvenas kruela penso. Ni devas iomete redanki la vulkanon, kiu tiel bone permesis la konservadon de tiu urbo, ankoraŭfoje mi rimarkos, ke la naturo mem, ofte bone aranĝas la aferojn. Plino la juna, antikva loĝanto de Pompei, skribante leterojn al historia Taĉito estis la unua spektanto, kiu atestis rilate katastrofegon kiu transformis Pompei kiel nekropolon.

Intertempe la jarcentoj malrapide pasis sen ke iu interesiĝis pri enterigita urbo, krom en la jaro 1139 okazis nova erupcio de la vulkano provokante novajn damaĝojn. Pli poste dum la jaro 1445 dank'al naskiĝo de tipografio oni presis antikvajn dokumentojn, kiuj disvastigis abundege al mondo la forgesitajn nomojn de la urboj malaperintaj, Erkolano kaj Pompei.

En 1631 ankoraŭ la vulkano grumblis kaj ekspulis denove, intertempe per favoraj hazardoj destino de tiuj postlasaĵoj ekvenis al taglumo; viro konstruante puton por serĉi akvon trovis kelkajn restaĵojn, kvankam en 1737 alia erupcio de Vesuvio rekovris la unuajn esplorojn.



Tamen la aŭstra princo Elbeuf okaze sian vicinvadon al regno de Napolo malkovris denove kelkajn trezormonumentojn sed urĝe sendis ilin al Vieno. La ĝusta vojo nun estas difinita kaj permesis ĉirkaŭ iri la remparojn, ankaŭ sub la diktatoreco de Napoleono oni elterigadis aliajn domojn kaj kompreneble oni ŝteladis pentraĵojn, mozaikojn, statuojn, tamen la brilego de la romana epoko, helpata nur multe pli poste per enmiksiĝo, kiu ordonis legprotektan, la itala registaro transformis Pompei kiel urbmuzeon unika el la mondo, krome oni daŭrigadas ankoraŭ fosi, ĉar nuntempe la enteresploroj ne estas finitaj.

Roberto FRUS.



«GARD» - FEDERACIO

La jarkunveno okazis en Nimes (urba biblioteko) dimanĉon la 21-an de Januaro 1973.

Post la kutimaj moralaj kaj financaj raportoj, ni ekzamenis diversajn sugestojn aŭ proponojn rilate pli bonan diskonigon de la lingvo.

S-ro PELLETIER parolis pri la printempa kunveno de la esperantistaj fervojistoj kiu okazos en Alès. La 7-an kaj 8-an de Aprilo, paralele kun la kongreso de la Federacio Langvedoko-Rusiljono, (la programon vi legos en ĉi tiu numero).

S-ro FRUS transdonis dezir esprimon de esperantistoj el Torino (Italio), por eventuala renkonto franca-itala.

Pro tro da okupateco kaj por pli bone helpi sian edzon prepari kaj sendi S. F. S. S-ino FRUS rezignas pri sia ofico de kasistino post tri jaroj.

F-ino Rolle el Nimes anstataŭos ŝin.

ZAMENHOFA FESTO

Sabaton la 16an de Decembro 1972 la Esperanta kultura Centro "Rousillon" en Perpignan festis la datrevenon de Dr. ZAMENHOF.

Prezidis S-ro René LLECH-WALTER kiu fondis la "Centro" en 1921; S-ro Jean AMOUROUX, parolis pri la verko kaj la vivo de D-ro ZAMENHOF.

Honora invitito estis S-ro PIRON, el Parizo, nun ripozanta en la Kataluna regiono.

Kukoj kaj vinoj kompletigis, agrable, la paroladojn.

Dimanĉon 17an de Decembro, ĝenerala sekretario de la radio-stacio "Perpignan-Roussillon" intervjuis S-ron LLECH-WALTER, pri la datreveno de D-ro ZAMENHOF. Dissendis la intervjon la radio stacioj de Nimes, Montpellier kaj Perpignan.

L'action de l'Union Française pour l'Espéranto (U.F.E.)

Lors de sa réunion de septembre 1972, le conseil d'administration de l'U.F.E. a été amené à prendre d'importantes décisions quant à l'avenir de notre association. Ces décisions concernent principalement l'acquisition d'un siège national, le relèvement du tarif des cotisations et le fonctionnement du vote lors de l'élection des membres du conseil d'administration et de la présentation du rapport annuel.

1°/ SIEGE NATIONAL:

La commission pour l'achat de la "domo" nommée lors du Congrès de Nantes travaille pour essayer de trouver une solution. Le problème le plus important est d'ordre financier. Actuellement, l'association dispose de 70.000 F., il en faudrait au moins 110.000.

Les fonds en espèces peuvent être adressés au CCP Paris 855-35 (Union Française pour l'Espéranto) en précisant "fonduso-domo".

2°/ COTISATIONS 1973 :

Compte tenu des charges sans cesse croissantes, et pour obtenir un budget en équilibre, la cotisation normale devrait être de 40,00 F. Ce chiffre est à atteindre en deux étapes. D'ores et déjà la cotisation de membre titulaire pour 1973 est fixée à 38,00 F. La ratification de cette décision interviendra lors du prochain Congrès. Il est à noter que le membre titulaire reçoit la Revue Française d'Espéranto, organe de notre association.

3°/ PROCEDURE POUR LES VOTES FEDERAUX:

Afin que les votes fédéraux se déroulent conformément aux statuts, le conseil d'administration décide d'inclure le bulletin de vote dans le numéro de la Revue Française d'Espéranto qui comprendra le rapport annuel du comité directeur, ainsi que le nom des candidats au poste de conseiller. Donc, pour prendre part au vote, il faut être membre actif abonné à la R.F.E. (membres titulaires, donateurs et bienfaiteurs ayant plus de 18 ans).

INFORMATIONS GENERALES

1°/ LA REVUE:

2 problèmes se posent : - le financement,
- la rédaction.

Financement. - Pour des impératifs d'ordre budgétaire, il est retenu le principe de ne faire paraître que 5 numéros tirés en offset et 1 numéro comprenant le rapport annuel, imprimé. "Espéranto-actualités" ne pourra pas paraître pour les mêmes impératifs budgétaires.

Rédaction. - Monsieur Hervé GONIN assure la rédaction de la revue depuis septembre-octobre 1972.

2°/ RECRUTEMENT DE MEMBRES.

M. SAUDIAN-ROUSSEAU présente son plan pour recruter des membres. En fait, il s'agit de faire appel aux membres déjà anciens qui n'ont pas payé de cotisation depuis plusieurs années et aux nouveaux élèves. Ce plan précise que chaque membre devra posséder une carte de membre revêtue du timbre-quittance UFE de l'année. Le conseil d'administration accepte le principe de ces cartes.

Le docteur ALBAUT précise que la société toulousaine a déjà emprunté cette voie depuis les nouveaux cours d'octobre. Un élève paiera une cotisation d'adhésion de 120,00 F. comprenant la cotisation UFE et UEA (68 F.) hormis le matériel et la cotisation locale.

«MONTPELLIER» - FEDERACIO

- SIDEJO : 5 rue Docteur ROUX. Tél. 72 81 43.
- KUNVENEJO: 15 rue Faubourg Figuerolles (apud Plan Cabanne, teretaĝo).
- KUNVENOJ: ĉiujn unuajn lundojn de la monato je 20 h. 45.
- INFORMAKCEPTO: la triajn lundojn de la 18 h. ĝis la 19 h. ĉe la kunvenejo (tiel oni povas babil).

Por renovigi kaj varmigi la kunvenojn, de oktobro ni prezentas teatraĵojn, pli ekzakte ni legas. Ĉiuj estas kontentaj, la rolantoj kaj la spektantoj, eble baldaŭ vi aŭdos pri grava, sperta teatra trupo

Ĉiun monaton, okazas informakcepto: kelkaj esperantistoj kunvenas kaj estas je la dispono de personoj, kiuj deziras informojn pri esperanto (ĉiujn fojojn ni aperigas anonceton en la loka gazeto).

Mi kaptas la okazon meti ĉe la montrofenestro de la kunvenejo grandan afiŝon pri E. ĉiuj esperantistoj, kiuj estas liberaj je tiu horo estas bonvenaj, ĉar oni libere babilas.

Yvette VIERNE.

Lastmomente

S-ro SAUDIAN-ROUSSEAU, vic-prezidanto de U.E.F. sendis al ĉiuj grupoj cirkuleron pri "naci-skala-opinio-sondo" Mi atentigas la estraron de la grupoj pri la graveco de tiu afero.

René LLECH-WALTER.

11 Lernantinoj (Femina Klubo) sekvas la esperantan kurson de S-ro BENAZET. Nun do 21 gelernantoj en Perpignan; Ĉiam antaŭen!

La Kastelo «Gresillon» sin modernigas

Dank'al la Kultura Asocio de la Kastelo "Gresillon" kiu organizis subskripcion, la unua serio de laboroj por la konstruado de la ĉambrego por kursoj kaj prelegoj estas antaŭvidita por tiu printempo.

La kasisto estas sinjoro Maurice COUSSE, 11 rue Alain de Rougé, 72300 Sablé sur Sarthe. Francujo, kiu ĉiam ricevas kun plezuro la aliĝojn kaj donacojn.

"Kulturaj kajeroj" publikigos la liston de la donacintoj kaj de la membroj.

« VORTOJ DE LA PREZIDANTO »

Ni aperigis en "Midi Libre" (regiona eldono) raporton pri la lasta federacia kunveno kun la adreso de la Federacio. Dank'al tio ni ricevis informdemandojn de du Montpellieranoj; ni sendis dokumentojn kaj informis F'inon Vierne.

Do kiel mi diris en la antaŭa cirkulero la senpaga aperigo de artikoloj en la gazetaro estas fruktodona.

Kiel vi ni organizis en Perpignan festeton je la okazo de la datreveno de la naskiĝo de Dr. Zamenhof; ni havis la plezuron akcepti samideanon PIRON el Parizo (li libertempas en la departemento) Jean AMOUROUX prelegis pri la verko kaj la vivo de nia majstro kaj okazis libera diskuto.

Interesa afero estas, ke la estro de la radio-stacio de Perpignan alvokis min por intervjuo okaze de la datreveno de D-ro ZAMENHOF. Ni havis nur 3 minutojn, sed tamen estas pli ol nenio, kaj la dissendo okazis pere de la stacioj de Nimes, Montpellier kaj Perpignan.

Mi konsilas al ĉiuj sendi ankaŭ la artikolojn, komunikojn k.t.p.; al O.R.T.F. rue Croix de Figuerole, La Colline, 34000 Montpellier.

Dank'al S-ro FRUS ni havas nun belajn afiŝetojn, la prezo estas 30 fr por 100 ekz. La grupo de Nimes pagos rekte al S-ro FRUS 30 fr, la grupoj de Alès, Montpellier, Narbonne, Perpignan pagos po 30 fr al S-ro DELIGNE. (c.p. Federation d'esperanto "Languedoc-Roussillon" 956-28 Montpellier).


Restos 1500 afiŝoj je la dispono de la grupoj, eble ni povos kontakti la najbarajn federaciojn. Se ni vendas ĉiujn afiŝetojn, estos profito por la Federacio dank'al la amika prezo de S-ro FRUS.

Laŭ Pilo-Press de Ludwig Pickol, Dro LAPENNA faros la festparoladon dum la Luksemburga Kongreso (Pentekosto 1973).

René LLECH-WALTER

- GRAVAJ PRECIZIGOJ -

Rilate la federacian kongreson de Alès, sendu aligilon antaŭ la 7-an de marto 1973. Uzu la ŝildon, kiu estas memglua, levante la malantaŭan paperon.



K R U C V O R T O J

HORIZONTALALE

- 1- Marksisto
- 2- Komuna manĝo ĉe la unuaj kristanoj (R)
Ĝibobovo (R) — Konjunkcio
- 3- Ĝi homon nutras — Pranomo de Trojo (R)
- 4- Por supren kaj malsupren inf
- 5- Fekundiga polvo — Franca urbo (R)
- 6- Inverse: adverbo — Havanta flavecan ĝis ruĝecan
koloron — Sciigi aliu, ke oni dezinas ricevi ion de li
- 7- Fantomo de mortinto — Prefikso
- 8- Insekta rabobesto (R) — Maldolĉa
- 9- Pruntoprenanto — Prepozicio
- 10- Nombro — Okazas siatempe — La plej
interna parto de io (R)
- 11- Mezepoka lirika poeto (R) — Nomo de litero
- 12- Rondo (R) — Necesaj farotaĵoj.

	1	2	3	4	5	6	7	8	9	10	11	12
1												
2												
3												
4												
5												
6												
7												
8												
9												
10												
11												
12												

R. KAYMAU

VERTIKALE

- 1- Li senkonsidere multe elspezas. 2- Silikaj ŝtonoj prezentantaj diafanajn koloraĵojn. Eligi gasojn el la stomako. 3- Plata peco da ligno (R) — Inverse: Ludkarto. Inicialoj de la aŭtoro de "Colas Breugnon" 4- Longa poemo — Citi, por senkulpigo (R) 5- Tia, ke oni povas ĝin trovi antaŭ si (R)
- 6- Linio kuniganta la terlokojn. Kiu havas la meznombran temperaturon (R) — Inverse: membro de grupo. 7- En iu loko — Ano de unu el la popoloj kiu apartenas al Islamo (R) — Sufikso. 8- Kruela policisto, precipe de despoto — Nigra recitisto de eposoj (R). 9- Maldolĉa kaj malpeza travidebla teksaĵo — Fruktu prefikso. 10- Adverbo — Difinita parto de kurbo (R)
- 11- Juvelo gannita de unu sola diamanto (R) — Metalo.
- 12- Japana monero, centono de eno (R) — Postsignoj restantaj de resaniĝinta vundo.

* (R) — nur radiko

* Solvinte la ludon (ĉu vertikale, ĉu horizontale)
trovu kvin vortojn, kiu formas proverbon.

* La solvo aperos sur la venonta S.F.S.

Solvo
de la Krukvortoj
aperinta sur la N. 45

La elstara verko
estas:
PLENA ILLUSTRITA VORTARO

S	T	E	A	T	R	B	L	S		
T	R	I	N	K	I	K	R	A	N	I
R	E	E	R	E	L	I	E	F	I	G
E	L	F	O	L	I	U	M	K	E	
P	O	L	I	P	S	K	A	L		
T	N	O	M	B	R	I	T			
O	R	O	L	A	R	O	P	R	A	
K	U	D	R	J	A	K	O	O	I	
O	M	O	A	S	K	E	T	T	L	
K	A	R	T	E	T	C	I	A	A	
O	N	I	R	R	R	V	I	E	N	
J	A	S	P	O	O	R	I	T		

5 minutoj da intervalo




Diru al via karulo, ke tio ne koncernas malvarmumon.




Kara, la okulisto diris, ke mi estas multege plibonigita.




SEN VORTOJ



Atentu ke vi eraras! Ĉi tie ni estas ĉe hipodromo.



Karlo alvenos tuj!



Ĉe kiu punkto vi estas kun mia TRIKOTO?

R. Faus

L'ESPERANTO

ET LES ENSEIGNANTS

Est-il encore besoin de présenter la langue internationale ESPERANTO, véritable fenêtre ouverte sur le monde ?

Mais si vous ignorez tout d'elle, ou si vous êtes peu renseigné, vous devez savoir que :


— **L'ESPERANTO** est une langue vivante beaucoup plus facile à apprendre que les langues nationales et qu'il est « en mesure d'exprimer les nuances les plus subtiles de la pensée et du sentiment », selon l'opinion de Maurice GENEVOIX.

— **L'ESPERANTO** est enseigné dans une trentaine d'Universités à travers le monde, dont celle de CLERMONT-FERRAND (par M. JANTON, professeur agrégé d'Anglais) et d'AIX-EN-PROVENCE (par M. DUC-GONINAZ, professeur agrégé de Russe).

— **L'ESPERANTO** est actuellement enseigné dans cinq pays d'Europe (Autriche, Bulgarie, Hongrie, Italie, Yougoslavie) à titre d'expérience et pour une durée de trois ans, dans un certain nombre d'écoles élémentaires et moyennes.

— **L'ESPERANTO** est utilisé pour des échanges scolaires internationaux par des centaines d'élèves du primaire et du secondaire qui souvent participent à la revue scolaire internationale « **Granoj en Vento** » (Graines au Vent).

— **L'UNESCO**, dans une résolution, a constaté que les résultats obtenus grâce à **L'Esperanto** correspondent aux mêmes buts et idéaux que les siens.



Aliĝilo resendota al R. RAYNAUD 4, rue Chotard - 30100 ALES

Ĝiri la monon al : Groupe Esperantiste la "Verda Stelo"

c. c. p. 836 52 Montpellier

COMMENT APPRENDRE L'ESPERANTO ?

Il s'apprend facilement par correspondance et, à cet effet, il existe plusieurs cours, dont ceux de l'Union Française pour l'Esperanto (34, rue de Chabrol - Paris 10°).

Mais il est préférable, quand on le peut, de suivre des cours oraux. Les enseignants français ont la chance de pouvoir se rencontrer à la MAISON CULTURELLE ESPERANTISTE, Château de Grésillon, à BAUGE (Maine-et-Loire). Des cours de différents niveaux y sont donnés pendant les vacances d'été et à Pâques.

Le Groupe des Espérantistes de l'Enseignement (G.E.E.), membre de l'Union Française pour l'Esperanto envisage d'y réaliser des stages spécialement destinés aux enseignants qui désirent apprendre la langue, se perfectionner, se familiariser avec les possibilités de la correspondance scolaire internationale...

« J'espère que le moment n'est pas loin où tous les hommes pourront communiquer entre eux par l'Esperanto ». Ecoutez ces paroles de Jean ROSTAND et n'hésitez pas à nous écrire pour tous renseignements complémentaires.

Ronéotypé pour la Fédération d'ESPERANTO Languedoc-Roussillon

Directeur de la publication : Roberto FRUS - Ecole Maternelle E. Vaillant II - Z.U.P. — 30000 NIMES

Dépôt légal : Premier trimestre 1973

ALIGILO

Mi deziras tranokti en ALÈS : nokto 7/8a de aprilo

8/9a »

Mi mendas unulitan ĉambron en hotelo : proksimume 18 F 24 F 35 F

La prezo estas por unu nokto.

Mi deziras partopreni en la komuna mango kaj ekskursoj al "Musée du Désert" kaj "Bambouseraie"

Mi sendas : 22 frs car mi uzos mian propran veturilon

25 frs car mi deziras iri aŭtobuse

Nomo Antaŭnomo

Adreso

Dato.

Subskribo.